

ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2016



ESPERANTO

ESPERANTON PÄIVÄ

26.7.2016

Kansainvälinen esperantokongressi, Bandung, Indonesia



Reilua viestintää



Asiaa kielistä: www.lingvo.info

Erikielisten viestinnästä: www.esperanto.net | www.uea.org

Opi
esperantoa:



www.lernu.net

KANSAINVÄLINEN KIELI

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300
Kansi/Pärm/Kovrile: Esperanto-tago 2016, www.linguistic-rights.org/esperanto-tago

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi
Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi
Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com
Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi
Andrei Dumitrescu, ☎ 040 411 6579 ✉ dumiac@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Maailman ja Euroopan kielet

Tätä kirjoitettaessa Britannian EU-kansanäänestys on kahden päivän päässä. Esperantolehden ilmestyttyä tiedämme tuloksen ja olemme lukeneet niin paljon kommentteja ja kannanottoja kuin kahlata jaksaa. Oli tulos kumpi tahansa, se on vasta pitkän väännön alku. Äänestystyshän on neuvoa-antava, ja päätös kuuluu lopulta parlamentille, kunhan hallitus ensin sitä esittää. Pääministeri David Cameronilla on vaikea paikka: hän voitti vaalit luvattuaan voittajana järjestää kansanäänestyksen, mutta on itse unionissa pysymisen kannalla. Jos maa päättää erota, tapaus on ennenkokematon. Edessä olisi aluksi ainakin kahden vuoden neuvottelut menettelytavoista.

Ne neuvottelut käytäisiin epäilemättä vain englanniksi. Euroopan unionilla on lähes yhtä monta virallista kieltä kuin jäsenmaita, kaikkien jäsenmaitten kaikki viralliset kielet, ja ne ovat keskenään tasa-arvoisia. Englanti on unionin 508 miljoonasta asukkaasta äidinkielenä lähes 70 miljoonalla. Ranskankielisiä on suunnilleen saman verran ja saksankielisiä vähän enemmän. Unionin yhteys kansalaisiinsa toimii kaikilla kielillä enemmän tai vähemmän tyydyttävästi. Poliittisen ohjauksen pitäisi myös toimia kaikilla tasoilla ja kaikkiin suuntiin kansalaisten äidinkiellillä, mutta sitähan ei kukaan tosissaan oletakaan. Euroopan unioni rikkoo johdonmukaisesti omia sääntöjään edellyttämällä usein syntyperäistä englanninkielen taitoa virkojen hakijoilta. Toki muittenkin kielten, lähinnä ”suurten”, taitajia haetaan. Suomenkin, mutta silloin on kysymys tehtyjen säädösten ja päätösten sekä kansalaisten asioinnin kääntämisestä.

Selväähän on, että kielipolitiikassa toiset ovat tasa-arvoisempia kuin toiset. Sen tasa-arvon juuria ovat mm. britti-imperialismin vuosisadat ja niitten perilliset, suuret englanninkieliset väestöt ja suurvallat eri puolilla maailmaa.

Britannian väestö on vain pienehkö osa koko englanninkielistä maailmaa. Jos Britannia eroaa, englanninkielisiä (kaksikieliset Irlanti ja Malta) jää supistuneeseen unioniin noin viisi miljoonaa.

Englanti jää yhdeksi virallisista kielistä ja varmasti myös pitkäksi aikaa käytetyimmäksi unionihallinnon sisäisistä apukielistä. Muutuuko mikään? Varmasti jokin, mutta ei kovin nopeasti. Englanti on nykyisin eniten osattu vieras kieli suurimmasa osassa Eurooppaa ja muuta maailmaa. Apukielen osaaminen on niin tarpeellinen taito, että sen opetus- ja käännöspalvelut on merkittävä osa englanninkielisten maitten, varsinkin Britannian, talouselämää.

Britannian asema saattaa muuttua eron seurauksena huomattavastikin. Useimmat tarkkailijat uskovat, että se ei ainakaan kohene. Britannia menettää kauppa- ja matkailuetuja, mikä saattaa haitata myös englanninkielen opetus- ja kulttuuriteollisuutta. Englannin syntyperäisillä osaajilla tulevaisuudessa ehkä enää olekaan automaattista etua eurobyrokratian työmarkkinoilla, ja unionihallinnossa vahvistuu muitten apukielten asema. Kilpailua ja ristiriitajakin varmasti esiintyy, kuten tähänkin asti.

Meillä historia on ollut suotuisa maalle, kansalle ja sen kielelle. Kaksisataa vuotta sitten alkoi kehitys, joka nosti rahvaankielen sille kuuluvan asemaan, ja pian sata vuotta olemme saaneet riidellä keskenämme keskenään tasa-arvoisilla kansalliskielillä. Meidän on syytä kannattaa EU:n tasa-arvoista kielipolitiikkaa vaatien sen todellista noudattamista.

EU on ja olisi ilman Britanniaakin iso, mutta ei ainoa monikielinen valtioyhtymä. Sellaisia ovat Intia ja Etelä-Afrikka, joissa englanti on vielä keskeisemmässä yhteiskieliasemassa, ja mm. Venäjä, jonka monikielisyys on omanlaisiaan. Ne kaikki ovat historian vaiheita, eikä esperantokaan historian loppu ole.



Tuomo Grundström

Kia prilingva diskuto?



Doktoro Jukka Pietiläinen (maldekstre) festis siajn 50 jarojn 17.6.2016 en Helsinko kun kvardeko da kolegoj kaj amikoj el lia ĵurnalista, scienca, politika kaj esperanta vivo. Li prezidis EAF kaj refondis EL - jen gratulas la nuna prezidanto.
Foto: Robert Bogenschneider.

Antaŭ pli ol dudek jaroj mi partoprenis profesian seminarion. Sperta kaj saĝa lerneja inspektisto tie klare difinis la temaron kaj la nivelon de la politika pedagogia diskuto en la plej alta forumo, la parlamento: "Oni diskutas pri religio kaj lingvoj. Pri religio, ĉu aŭ ne ĝi estu lernobjekto aŭ ĉu estu instruata 'konfese' aŭ 'objektive'. Pri lingvoj, ĉu aŭ ne la sveda lingvo estu instruata al ĉiuj lernantoj en la baza lernejo."

En kvaronjarcento ne multo ŝanĝiĝis. En la dua juna semajnfino kvar Finnlandaj politikaj partioj, du registaraj kaj du opoziciaj, kunvenis en siaj regulaj kongresoj. Kvina, registara, ankaŭ havis gravan kunvenon.

Estas malfacile trovi klarajn starpunktojn pri lingvopolitiko en dokumentoj de tiuj kunvenoj. "La Veraj Finnoj" sin profiligas postulate abolon de la dulingveco. La Svedlingva

Popolpartio memklare tiun defendas kiel konsistigan parton de nacia unueco. Maldekstraj proksimas al la lastenomita, do pli "konservativaj" ol dekstraj kaj centraj kritikantaj pezecon de la lingva programo kun almenaŭ du lingvoj fremdaj por lernanto.

Politikistoj ĝenerale postulas fruan instruadon de lingvoj. Unu novelektita partiĉeŭo proponis komenci fremdlingvon (anglan) al ĉiuj jam en infanĝardeno. Kiel kialo estas kutime prezentata bezonoj de komerco kaj industrio. Prave, certe, ekonomio bezonas lingvosciajn homojn. Malpli ofte oni renkontas la ideon, ke homoj bezonas lingvoscion por sia kresko. "Grandaj kaj gravaj" helplingvoj estas fabriko kaj oficejo; Esperantujo – ĝardeno kaj biblioteko.

Tuomo Grundström

Komitatanoj B sen balotoj

Estas jam konataj la nomoj de la komitatanoj B kiuj ekoficos en la 101-a Universala Kongreso de Esperanto. El la ok personoj (www.uea.org/gk/608a1) kiuj kandidatiĝis por la ses lokoj, intertempe du retiris siajn dokumentojn. Tio signifas ke la ceteraj estas rekte elektitaj al la Komitato, la supera organo de la Asocio.

En la jaroj 2016–2019 la individuajn membrojn en la Komitato reprezentos *Emilio Carlos Vaz Cid* (Brazilo), *Mark Fettes* (Kanado), *Maritza Gutiérrez González* (Kubo), *Stefan MacGill* (Hungario), *Barbara Pietrzak* (Pollando) kaj *José Antonio Vergara* (Ĉilio). Ilia oficperiodo komenciĝos samtempe kun tiu de la cetero de la Komitato, en la unua tago de la 101-a UK en Nitro. *Johan Derks* (Serbio) kaj *Roy McCoy* (Nederlando) rezignis pri la kandidateco.

Krom la ses menciitoj, la Komitaton konsistigos la komitatanoj A, kiujn nomumos la landaj asocioj kun almenaŭ 100 membroj, la aliĝintaj fakaj asocioj (po 1) kaj la junulara sekcio TEJO (2). Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj, la komitatanoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, alektante komitatanojn C. En Nitro la tuta Komitato elektos el siaj membroj la Estraron de UEA.

En 2013 estis elektitaj ses komitatanoj el sep kandidatoj, en 2010 por ses postenoj kandidatiĝis 16 personoj. En 2007, same kiel ĉi-jare, la balotoj ne okazis: tiam estis kvin kandidatoj por ses lokoj kaj ĉiuj aŭtomate elektiĝis.

[GK de UEA]

Esperanton kesäkurssi lisalnessa – Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016

Deko da partoprenantoj (kaj progresantoj kaj elementanoj) jam aliĝis al la Somera kurso. Ankoraŭ eblas aliĝi, do venu ankaŭ vi! La multflanka programo kaj aliaj scioj estas legeblaj en Esperantolehti 2/2016 kaj ankaŭ en la retpaĝoj www.esperanto.fi.

Pliaj informoj kaj aliĝoj de Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358 50 5494709. Bonvenon!

Esperanton kesäkurssille Iisalmeen on jo ilmoittautunut toistakymmentä osallistujaa. Vielä ehtii mukaan, joten ilmoittaudu heti liiton sihteerille. Ohjelma, hinnat ja muut tiedot ovat Esperantolehden nrossa 2/2016 sekä nettisivulla www.esperanto.fi.



Gražina Opulskienė,
fotis TO



Onni Kauppinen, fotis
Gražina Opulskienė

Yhteyshenkilö Tiina Oittinen,
eafsekretario@esperanto.fi, tel. 050 5494709.
Tervetuloa!

Kalle Kniivilän venäläisistä kertova trilogia

Keväällä 2016 ilmestyi miltei samanaikaisesti Helsingissä suomeksi, Tukholmassa ruotsiksi ja New Yorkissa esperantoksi teos ”Neuvostomaan lapset – Baltian venäläiset”. Kirjoittaja työskentelee Malmössä ilmestyvän Sydsvenska Dagbladetin Venäjään erikoistuneena toimittajana. Hänen kirjansa ”Putinin väkeä” sai Suomessa tunnetun Kanava-palkinnon vuonna 2014 parhaana tietokirjana. Seuraavana vuonna hän julkaisi reportaasin ”Krim on meidän”. Parhaillaan lukijat perehtyvät sarjan kolmannen osaan ”Sovjets barnbarn”.

Tekijä vieraillee ahkerasti Venäjällä ja Baltiassa. Hän tekee havaintoja ja haastattelee paikallisia ihmisiä. Näin välittyä lukijoille elävä kuva tämän päivän tavallisista venäläisistä ja heidän ajattelutavoistaan. Monipuolisesti toimittaja Kniivilä pureutuu Viron, Latvian ja Liettuan vähemmistöjen elämän arkipäivään. Avoimesti hän kertoo myös ihmisryhmien välisestä kitkasta. Teoksessa kosketellaan niitäkin ongelmia, joita tavallinen matkailija ei aina helposti huomaa.

Venäläiset aivan oikein korostavat sitä, että he vapauttivat Viron 1944. Tämän tosiasian tunnustaen virolaiset näkevät tilanteen toisin. Heidän mielestään venäläiset unohtivat palata kotiin. Raskaat kokemukset voidaan pukea huumorin naamioimaan viittaa. Teoksessa selvitetään tarkasti kansalaisuuden myöntämisen problematiikkaa eri puolilla Baltiaa. Liettua selvitti nämä ongelmat joustavasti, sillä siellähän oli vähiten venäläisiä asukkaita. Ihailua herättää tekijän kirjoittaminen sujuvan taitavasti kolmella kielellä - suomeksi, ruotsiksi ja esperantoksi.

Venäjää taitamattoman on erittäin mielen-

kiintoista seurata koskettavia haastatteluja. Näyttää siltä, että tavallinen kadunmies uskaltaa jo ilmaista ajatuksensa avoimen vapaasti ulkomaalaisellekin kyselijälle. Maan viralliset tiedotusvälineet ovat vahvasti valvottuja uutisten välittäjiä kotimaan ja ulkomaisten asioissa. Kniivilän venäjänkielen taito on todella toimiva väline tiedonhankinnassa. Teksti vie lukijan mennessään.

Kniivilän trilogia on saanut erittäin myönteisen vastaanoton. Ruotsin lehdistö kirjoitti jo ensimmäisestä osasta innostuneen haltioituneesti. Dagens Nyheter totesi reportaasin arvostetuksi teokseksi, joka lisää Venäjän ja venäläisten ymmärtämystämme. Sitähän me juuri nyt kaipaamme ja tarvitsemme naapurimme arvoituksellisuuden ymmärtämiseksi. Aftonbladet kuittaa lyhyesti: ”Ett strålande reportage”. Koko trilogia on kylpenyt arvostelun auringonpaisteessa. Jossain on ehdotettu teosten kääntämistä venäjäksi, jotta itäisen naapurimme kansalaiset saisivat katsoa itseään peilistä. Näemme päivittäin idän ja lännen vastakkainasettelun. Kniivilän teksti laajentaa näkökenttäämme.

Jörn Donner arvosteli trilogian tuoreimman version HBL:ssä 5.6.2016 erittäin myönteisesti. Hän ihmetteli vain Narvan kaupungin katukilpien muuttamista yksinomaan viro-kieliseksi, vaikka miltei koko väestö siellä on totaalisesti venäjänkielistä. Ehkä Paasikiven linjanveto pitäisi päivittää. Kniivilän trilogia viittaa siihen suuntaan.

*Jorma Ahomäki
Kaarina*

Muuttuvaa maailmaa ihmettelevä

Kalle Kniivilä intervjuas en Baltio

En marto 2016 estas subskribitaj dankvortoj por la verko "Neuvostomaan lapset – Baltian venäläiset". La aŭtoro uzas sian jam konatan intervjuan metodon, kiu efike taŭgas por la celo. La ruslingva malplimulto en Estonio, Latvio kaj Litovio pere de siaj reprezentantoj libere esprimas kvintesencon de siaj pensoj kaj de sia sinteno al la nuna situacio en la menciitaj landoj. Kalle Kniivilä skribas en bela kaj moderna fina lingvo. Leganto ofte haltas por pripensi, kiel la verkisto trovis tre trafajn hodiaŭajn lingvajn esprimojn. Varman gratulon meritas nia samlandano, kiu jam longtempe konstante loĝadas en la urbo Lund.

En la teksto abundas multaj gravaj informoj pri faktaj okazintaĵoj. Rusoj en la jaro 1944 liberigis Estonion, sed ili forgesis reveni hejmen. Tiaj tikle trafaj faktoj estas vualitaj belferme.

Kalle mirinde precize konas la esencajn trajtojn kaj faktojn de la baltia historio. Finnoj volonte sekvas tion, kio okazas en la landoj ĉe la Balta Maro. Jen estas eta kaj praktika manlibro pri la temo. Ne estas facile flankenmeti la libron, kiu forte altiras leganton daŭrigi la studadon.

Iel tre plaĉas la fakto, ke intervjuitaj personoj libere esprimas sian opinion. Povas esti, ke timo pri forpelo al Siberio jam malaperis kaj homoj kuraĝas agi malferme. Kalle skribas kaj laboras rapide. Tion mi tutkore admiras. Estas mia emo ĉi tie imiti lin kaj kiel eble plej rapide doni rekomendindajn informojn. Tute certe la nova verko entuziasmigos multajn legantojn. La enhavo ne trompos vin. Nepre vi ĝuos. Fruktonon legadon al ĉiuj.

*Jorma Ahomäki
La unuan de junio 2016*

Sinprezento de Andrei

Mi nomiĝas *Andrei Călin Dumitrescu* kaj estas 28-jaraĝa. Mi naskiĝis kaj pasigis la plejparton de mia infaneco en Rumanio, sed kiel 15-jara knabo translokiĝis kune kun mia familio al Finnlando. Mi eklernis Esperanton tuj post la translokiĝo kaj ektrovis multegajn amikojn el la tuta mondo pere de interreto. Post komenco de miaj studoj en Helsinko mi aliĝis al *EsperHe* kaj poste ankaŭ al FEJO, kies prezidanto mi estas jam de pluraj jaroj.

Mi ĉiam interesiĝis pri lingvoj kaj nuntempe studas ĝeneralan lingvistikon en la Universitato de Helsinko. Mi tre ŝatas lerni lingvojn por pli bone komunikiĝi kun homoj el diversaj landoj, sed ankaŭ scivolemas pri ilia strukturo kaj historio. Esperanto okupas apartan lokon en mia vivo kiel lingvo de internacia justeco kaj ami-

keco, en kies komunumo mi ĉiam sentas min ĝoja kaj libera.

Mi jam trifoje ĝis nun instruis Esperanton en la universitato. Instruado de lingvoj estas preskaŭ same amuza kiel lernado, tamen allogo de lernantoj al daŭra aktiveco en nia movado malofte sukcesas. Plia neforgesebla sperto kiun mi havis dank' al Esperanto estis la muzikgrupo *Dolchamar*, en kiu mi ludis klavaron kaj blokvklavaron dum kvar jaroj.



Andrei Dumitrescu

Aŭtunaj Tagoj en Taivalkoski – Syyspäivät Taivalkoskella 24.–25.9.2016

PROGRAMO – OHJELMA

(ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

SABATO / LAUANTAI 24.9.2016

9.00 Buso/bussi Oulu-Taivalkoski-Saijan Lomakartano/Feria bieno Saija (feria bieno Saija situas en Jokijärvi, 22 km de Taivalkoski)

11.00–12.30 Lunĉo. *Lounas. Saija.* (viandaĵo, *Arwolan lihamureke*)

13.00–13.30 Malfermo. *Avajaiset.*

14.00–14.40 *Kallioniemi* (infana hejmo de la verkisto Kalle Päätalo, *Kallen lapsuudenkoti*)

15.00–16.00 Taivalkoski: Vizito al vendejo de Jalava, kie ni aŭdos pri la historio de la loko; kafenjo proprakoste. *Vierailu Jalavan kaupassa, kuullaan paikan historiaa; kahvit omakustanteisesti.*

16.15–17.45 Päätalo-centro/keskus: ekspozicio pri Kalle Päätalo / *näyttely Kallen elämästä*; filmoj/elokuvat: *Räntyt ja kuolehtukset & Reveno* al Finnlando; ekspozicio de esperantofabeloj/*esperantosatunäyttely*

19.00–21.00 Vespermanĝo en feria bieno Saija (memserva bufedo, ĉefa plado fiŝaĵo). Amuza kunestado. *Saijan lähiruokaillallinen (noutopöytä, pääruokana kalaa).* Mukavaa yhdessä-oloa.

DIMANĈO / SUNNUNTAI 25.9.2016

8.00–9.30 Matenmanĝo. *Aamiainen. Saija*
9.30 Ekveturo per buso al la lernejo de Jokijärvi. *Lähtö bussilla Jokijärven koululle.*

10.00–10.30 Ĉe la preĝejo memoraĵo sur korto de la lernejo de Jokijärvi ni renkontos kun la antaŭa pastro *Juho Barkmann* de Taivalkoski (kiun prezentas al ni aktoro). Ni aŭdos pri la historioj de la lernejo kaj preĝejo kaj pri lernejaraj jaroj de Kalle Päätalo. *Tapaamme Juho Barkmannin, Taivalkosken kirkkoherran yli sadan vuoden takaa, kirkon muistomerkillä Jokijärven koulun pihapiirissä. Kuulemme sekä Jokijärven koulun että kirkon historiaa, myös Kalle kävi koulua täällä.*

10.45–11.45 Konatiĝo al la fervojo kaj iliaj pordegoj en Peuralampi kun loka ĉiĉerono. *Kenttärataan ja sen portteihin tutustuminen. Peuralampi, opas Säte Kangasniemi.*

12.15–13.30 Lunĉo. *Lounas. Arbar-Bar, Metsäkylä.*

13.45–14.45 Konatiĝo al la fervojo en Metsäkylä kun loka ĉiĉerono. *Kenttärataan tutustuminen Metsäkylässä, opas Tuomo Horsma.*

15.00–16.00 Vizito en fabela arbaro (Arbaro de Zamenhof) en Metsäkylä. Adiaŭa kafeto. *Esperantosatumetsä Metsäkylässä. Päätöskahvit Halkolan pirtissä.*

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville
24.–25.9.2016 Taivalkoskella.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu (sis. opastukset ja vierailut
Taivalkoskella):

62 € 31.7.2016 asti _____

68 € 31.7.2016 jälkeen _____

AT-paketti: lomakartano Sajjassa (1 yö 2-hh:ssa,
2 lounasta, 1 illallisen) 120 € _____

Bussikuljetus Oulu-Taivalkoski-Oulu (Oulusta tule-
ville) 20 €/henkilö _____

Bussiajelumaksu Taivalkoskella (suoraan Taival-
koskelle tuleville) 10 €/hlö _____

**Maksut yht. Suomen Esperantoliiton
tilille:** _____

Tilinumero:

FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai
viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä (voit
lähettää myös suoraan yhteysenkilöille):

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

Venontaj



La verkisto Kalle Pääatalo donacis en 1998 sian arkivon al la
komunumo de Taivalkoski.

*Kirjailija Kalle Pääatalo lahjoitti arkistonsa Taivalkosken kunnal-
le vuonna 1998.*

Ni karavanu nun en Finnlando / Karavaani tällä kertaa Suomessa

La longa vojo el la suda Finnlando al Taivalkos-
ki pasos plej bone en komuna aŭtobuso. La bus-
kompanio *Launokorpi*, nia fidela karavanvetu-
ranto al multaj kongresoj, denove ofertas al ni
komfortan vojaĝon. Necesas 20 partoprenantoj
por realigi la karavanon.

Ekveturo el Turku vendrede 23.9. je 16, itine-
ro tra Tampere kaj Jyväskylä, alveno meznok-
te al Oulu, tie tranoktado. Reen dimanĉe 25.9.,
survoje tranoktado, en Turku posttagmeze lun-
de. Prezo por la tuta vojaĝo (Turku-Oulu-Turku)
130–150 €, malpliigo ĉ. 20–50 €, se vi kunvetu-
ros ekzemple de Tampere. Krome du hotelaj tran-
oktadoj, po ĉ. 50 €/nokto/persono.

Vi povos veni al la buso ankaŭ de Oulu kaj
tiam pagi por la veturo 20 € tien reen al Taival-
koski. Se vi venos rekte al Taivalkoski, vi pagos
10 € pri la rondveturo surloke. Aliĝu al la kara-
vano al sekretario de EAF, Tiina Oittinen, [eaf-
sekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), tel. +358 50 5494709.
Ŝi respondas al viaj eblaj demandoj koncerne
de vojaĝeblecoj al Taivalkoski. En la finnlingva
parto pli detalaj informoj ekzemple pri trajnoj,
kiujn ĉiu mendas mem.

Ĉe la memorŝtono por la polaj militkap-
titoj, kiuj konstruis la fervojon en Taival-
koski. Florajn salutojn portis delegitaroj el
Pollando kaj la komunumo de Taivalkoski.
Stanislav Chiechanovski, Monika Lelejo,
Zbigniew Krzywosz ja Grzegorz Jelenski.

*Muistokivellä Puolan delegaation jäsenet
kunnioittavat kenttärataa rakentamassa
olleita maanmiehiään. Kukkatervehdys
myös Taivalkosken kunnalta.*



Surloke de la nunaj informtabuloj en
kampadejo de Peuralammi estis dum
la milita tempo informcentro en ba-
rakedometo.

*Peuralammin leirin opastetaulujen
kohdalla oli ratatyömaan aikana vies-
tikeskusparakki.*

Ĉe la pordegoj loka ĉiĉerono rakontas al
polaj gastoj pri konstruado de la fervojo.

*Kenttäradan porteilla opas Sæde Kangas-
niemi kertoo puolalaisille vieraille radan
rakentamisesta.*





La AT-programo koncentriĝas dimanĉe en la fervojo konstruita de militkaptitoj. En la bildo la bazo de la fervojo, kiu nuntempe servas kiel landvojo inter Jokijärvi kaj Metsäkylä.

Syyspäivien sunnuntain ohjelma keskittyy sodanaikaiseen kenttärataan. Tässä sotavankien rakentaman kenttäradan pohjaa, joka on nykyisin maantienä Jokijärven ja Metsäkylän välillä.

Taivalkoskelle on Etelä-Suomesta pitkä matka, joka taittuu mukavimmin yhdessä. Olemme pyytäneet tarjousta bussiyhtiö Launokorpi Oy:ltä, jonka kydyissä olemme tehneet useamman karavaanimatkan kongresseihin. Reitiksi on suunniteltu Turku-Tampere-Jyväskylä-Oulu, mutta vaihtoehtona on myös kasitie rannikkoa pitkin. Matka tarvitsee toteutuakseen vähintään 20 osallistujaa.

Lähtö Turusta perj. 23.9. klo 16.00, perillä Oulussa puolenyön aikoihin ja yöpyminen siellä. Paluumatkalla samoin yksi yöpyminen su-ma, esim. Kalajoella tai Viitasaarella. Launokorven bussi on käytettävissämme myös Oulusta Taivalkoskelle ja takaisin sekä Taival-

koskella ajettavissa matkoissa. Koko matkan (Turku-Oulu-Turku) hinnaksi tulee 130–150 €, hinta laskee noin 20–50 €, jos tulee mukaan esim. Tampereelta. Lisäksi tulee kaksi hotelli-yöpymistä, noin 50 €/yö/hlö.

Oulu-Taivalkoski-Oulu bussimatkasta perimme 20 €, kun tulee bussiin Oulusta. Bussi lähtee Oulusta klo 9.00. Ne, jotka tulevat suoraan Taivalkoskelle esim. omalla autolla maksavat busstajelumaksun 10 €.

Junayhteyksiä selvitettäessä kävi ilmi, että VR tekee ratatöitä 23.9., jolloin Ouluun menee etelästä vain yksi yöjuna (perillä klo 4:40 lauantaina 24.9.). Myöskään ei ole enää mahdollista varata makuupaikkoja ryhmälle, kuten

joskus ennen on tehty. Näin ollen junalla matkustavat tekevät itse matkavarauksensa. Sunnuntaina 25.9. on etelään meneviä yöjunia useampia.

Tiedustelut ja ilmoittautuminen karavaaniin liiton sihteerille, Tiina Oittiselle mahdollisimman pian, jotta tiedämme otammeko bussin jo Etelä-Suomesta.

Aliĝu plej eble baldaŭ / Ilmoittaudu mahdollisimman pian

La unua limdato por AT en Taivalkoski estas jam fine de julio, por ke ni sciu kiom da personoj intencas veni. La kotizoj estas ĉi-foje iom pli altaj, sed Finnlando estas granda lando, kaj kelkfoje estas bone kaj juste veturi ankaŭ al iom pli foraj lokoj. Dankon al Aini pro la invito kaj pro la ĝisnunaj aranĝoj. Ni partoprenu multnombre!

Taivalkosken syyspäivien ensimmäinen ilmoittautumisaika on jo heinäkuun lopussa, jotta

ta pystymme varautumaan mahdollisiin muutoksiin. Päiville osallistuminen maksaa tällä kertaa jonkin verran enemmän kuin tavallisesti, mutta on ihan reilua, että menemme välillä pohjoiseenkin. Kiitos jo tässä vaiheessa Ainille kutsusta ja järjestelyistä. Nyt vain matkaa suunnittelemaan! Päätalon tekoselkoset odottavat.

Kontaktuloj / Yhteyshenkilöt

Pri praktikajoj en Taivalkoski kaj Oulu. Käytännön asiat Taivalkoskella ja Oulussa: Aini Vääräniemi, aini.esp@hotmail.com, tel. 040 518 7242. Aini on Oulun esperantoseuran puheenjohtaja. Aini estas prezidanto de Esperanto-societo de Oulu.

Pri karavano kaj aliaj aranĝoj. Bussikaravaani ja muut matkajärjestelyt: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, tel. 050 549 4709.

Bonvenon al Aŭtunaj Tagoj! Tervetuloa syyspäiville!

Raporto pri la jarkunsido de Salo-klubo

Esperantoklubo de Salo – Salon Esperantoseura – jarkunvenis la 26-an de februaro 2016: Tuoko Tähtinen (estrarano), Sylvi Ekman-Järvinen, Anna Ritamäki-Sjöstrand (vicprezidanto), Sinikka Hangas (sekretario-kasisto) kaj Matti Wallius (prezidanto). La kunveno memoris pri du forpasintaj aktivuloj, Carola Antskog kaj Eero Saari. La klubo diskutis eblan endormigon aŭ malfondon, sed volis plu teni siajn bazajn funkciojn



La estraro

malgraŭ la malgrandiĝo de la membraro. Novaj membroj kaj iniciatoj estas bonvenaj.

Anna Ritamäki-Sjöstrand

Raporto pri Sveda Esperanto-kongreso en Pollando

SEF kunlabore kun polaj esperantistoj okazigis sian kongreson en t.n. Triurbo 5.–9.5.2016. Ankaŭ 3 finnoj partoprenis inter la alilandanoj, entute sesdeko da homoj. SEF en sia Jarkunsido elektis novan prezidanton, *Olof Petterson*.

La Triurbo *Gdansk-Sopot-Gdynia* situas sur la nordpola marbordo inter Litovio kaj Danlando. El aviadila fenestro oni vidis la longegajn plaĝojn, kie la mallarĝa tera langego etendiĝas paralele kun la ĉeflando, multobligante la strandojn. La pola esperantisto *Andreo Bach* bonvole akceptis nin en la flughaveno kaj veturigis nin tra verda fagaro al nia hotelo *Szydłowski*. Lia blanka aŭto portas sur si la nomon Amiko, kiu estas ankaŭ la nomo de lia entrepreno.

Ne ĉiuj el ni ĉeestis la Jarkunsidon de SEF. Oni rajtis partopreni ekskursojn aŭ sekvi siajn proprajn dezirojn. Ĉio estis bonege aranĝita, la poloj estis akurataj kaj helpemaj. En *Gdańsk* kaj ties apudaj urbetoj loĝas 750.000 homoj. La flughaveno, trajnoj, busoj, tramoj bone funkcias. Nur okazis la miskompreno, ke aŭdinte ke pli ol 70-jaruloj rajtas vojaĝi senpage en la tramoj kaj busoj de la urbo, la plej maljunaj el ni ne ĉiam aĉetis bileton. Unu fojon unu el ni estis preskaŭ arestita pro tio, ke ŝi ne havis la bileton en la buso. Nur tiam niaj gvidantoj aŭdis kaj poste sciigis, ke kelkaj entreprenoj malprobos fremdlandajn nepagantojn. Nu, mi ja tion komprenas. La senpagaj vojaĝoj enurbe estu nur por tiuj, kiuj laboris loke kaj tiel profitigis sian urbon/landon. Por tieaj pensiuloj tio estas granda kaj ĝojiga avantaĝo kaj ni eksterlandanoj ne havu la saman rajton kiel ili! Tamen ankaŭ en niaj landoj tia avantaĝo estus tre bonvena kaj utila al pensiuloj.



La giganta kantistino (stilzoj ne videblas).

La vetero estis brile suna, fruktoarboj floris, same bulbofloroj kaj ornam-arbustetoj. Sur la plaĝoj homoj jam sunumis sin en banvestoj. En la parkoj kaj arbaro kreskas fagoj kaj aliaj specoj, kiuj ne kreskas ĉe ni. La tero multloke estas fajne sableca. Ni promenis sur deklivejoj kovrataj de fagoj en granda parko/arbaro malantaŭ nia hotelo.

En la urbocentro ĉiuj turistoj svarmas en la "Longa Foiro", larĝa piedira stratego kun statuoj, butiketoj, kafejoj, restoracioj, fontano, tute ruinigita en la 2-a mondmilito, sed rekonstruita post 1945 por esti la sama, kia ĝi estis antaŭ la milito. Inter la turistoj kaj sinamuzantoj oni povas vidi ankaŭ almozpetantojn: junaj ciganinoj kun infanetoj, maljunaj rusaj akordionistoj kaj vendistino, kripluloj, klaŭno vendanta balonojn.



Avo Harry Spirowski dekstre, lia filino maldekstre kaj nepino sur la ZEO.

Ni vizitis *Sopot*, kie la moleo longas pli ol duonkilometron. Tie homoj sidas kaj promenas rigardante al la blua maro, al la ŝipoj venantaj kaj forirantaj, inter ili buntaj pirataj velŝipoj por pagemaj turistoj. Almenaŭ du ĵus geedziĝintajn parojn kun siaj eskortoj ni vidis, ĉar ili venis tien por fotigi sin bele vestitaj en belega fama loko. Ni vizitis la klubejon de lokaj esperantistoj, ilian Arbarherbejon, kie kreskas Jubilea kverko zorgata de familio *Spirowski*. Avo, filino kaj nepino lasis nin foti la 3 generaciojn ĉe la memorŝtono. En 1938 Hitlerana batalgrupo forhakis kaj detruis la ŝtonon kaj la kverkon, sed polaj esperantistoj replantis kaj reprizorgis. En 1959 TEJO gravurigis sciigojn sur la kolosa ŝtonego. Imagu, mia amikino *Kerstin* tiam ĉeestis kaj nun denove, post sesdeko da jaroj. Muzikis kaj kantis tie *Kim* kun sia filo, *A. Bach* kaj aliaj esperantistoj, ni ankaŭ kantis el speciala kajero donita al ni.

En la Interkona vespero bonvenigis nin giganto kaj kantis por ni gigantino sur stilzoj, ni vidis filmon pri la astronomo *Hevelius*, kiu la unua desegnis bonan mapon pri la luno

kaj trovis sepcenton da novaj steloj. Ekde la infanaĝo li havis akran vidadon. Ni estis regalataj per abuna kaj bele metita bufedo. En alia tago, en loka biblioteko ni aŭdis prelegon de *Tomasz Chmielik* pri tradukarto, la Literaturhistorio de *Minnaja* kaj pri la nobelpremiitino *Wisława Szymborska*, kies poemoj estis deklamitaj pole, svede kaj Esperante. Mi aĉetis la kolekton *Mi inventas la mondon*.

Mi pensis pri mia mortinta edzo kaj lia ideologio. Siatempe li trovis *Lech Wałęsa* perfidanto kaj netaŭgulo. Nun la flughaveno de Gdańsk fiere portas lian nomon kaj ornamas sian muregon per fotoj pri li kiel laboristo, ribelanto, prezidento, patro, edzo... Mi ne iris al la centro *Solidarność*, ĉar mi volis libere rondiri en arbaro/urbo.

Nia vojaĝo al Pollando estis multdona kaj mi ne povus priskribi ĉion, eĉ se mi provus. Mi povas rekomendi tian vojaĝon al ĉiuj.

Raita Pyhälä

Viro parolanta nur Esperanton

Foliumante malnovajn Esperanto-gazetojn nomatajn "La Praktiko" mi vidis en la unua postmilita numero (1946) de la gazeto interesan artikolon pri viro, kiu krom Esperanto parolis nenium alian lingvon. Kiel tio eblis?

Temis pri viro, kies patro estis svedo kaj la patrino grekino. La gepatroj renkontiĝis dum iu Esperanto-evento en Barcelono post la 1-a mondmilito, enamiĝis kaj ge-edziĝis kaj restis vivi dum kelkaj jaroj en Hispanio. Tie la filo naskiĝis. Li estis prizorgata hejme kaj aŭdis nur Esperanton. Poste la familio ofte transloĝiĝis de unu lando al alia pro la laboro de la patro. La filo neniam havis tempon por bone lerni la lokan lingvon. Finfine la familio transloĝiĝis al Usono, kie la patro kun kelkaj aliaj esperantistoj luis insulon en la maro proksime al Los Angeles. Tien transloĝiĝis centoj da esperantistoj konsistante el 40 familioj el 20 nacioj. La insulo nomata "Insulo de la Feliĉo" vivis sian sendependan vivon kaj publikigis eĉ proprajn esperant-ling-

vajn poŝtmarkojn. Tie la juna knabo kreskis kaj edukiĝis inter nur esperantistoj.

Malfeliĉe la harmonia vivo de la insulo finiĝis pro la dua mondmilito post la japana atako al la usona stabo en *Pearl Harbour* (1941). Tiam Usono aliĝis al la milito kaj devigis la enloĝantojn de la "Insulo de la Feliĉo" evakuiĝi, ĉar Usono fondis siajn militistajn stabojn ĝuste sur tiun insulon. Ankaŭ la juna esperantisto parolante nur Esperanton komencis servi en la usona armeo kaj devis lerni la bazajn militajn vortojn de la usona lingvo por kompreni la armeajn ordonojn. Li fariĝis serĝento kaj li servis kvar jarojn en la usona armeo en pluraj landoj. Ĉie li serĉis kontaktojn al lokaj esperantistoj por fratece konversacii per la gepatra lingvo por eĉ iomete forgesi la militajn teruraĵojn. Post la milito li vizitis ankaŭ la oficejon de "La Praktiko" rakontante sian historion. Sekve liaj travivaĵoj estis raportitaj en la gazeto.

Arja Kuhanen

Penseroj pri dulingvismo

Antaŭ kelkaj jaroj aperis interesa verko "Både och, sekä että", kies ĉefa temo estas dulingvismo. Finnlando estas oficiale dulingva. En la konstitucio oni determinas la aferon. Finnlingvanoj havas fortan majoritaton de pli ol 90 procentoj kaj svedlingvanoj nombras malpli ol 10 procentoj. Finnlando estis pli ol 700 jarojn parto de la Sveda Reĝlando.

Ple ofte la dulingvismo ekestas, kiam la gepatroj parolas la diversajn lingvojn. La procezo evoluas tute nature en la familia kadro. El la vidpunto de Esperanto *Aleksandra Salmela* verkis interesan eseon "Pripensoj en la kolizia tereno de lingvoj". Ŝi estas slovakino, kiu studis la finnan lingvon unue en la universitatoj de Bratislava kaj Prago. Poste ŝi daŭrigis la studadon

en Finnlando, kie ŝi jam loĝis pli ol dek jarojn. La familio vivas en la urbo Tampere.

Nur post la verkado de la menciita eseo Aleksandra Salmela mem ekpensis, ke ŝi estas dulingvulino. Indas menci, ke ŝi nun ŝi verkis tri librojn en la finna lingvo. Kiam mi sekvis ŝiajn intervjuojn en la Finna Televido mi admiris ŝian kapablon flue kaj bele paroli la finnan lingvon. Tute humile ŝi substrekas la malfacilaĵojn de la finna lingvo, kiu apartenas al la finn-ugra lingvofamilio. Ofte en la starta studperiodo estis al ŝi malfacile memori, ke adverbo en la frazo ĉiam venas post verbo.

Estis tute kompreneble, ke ŝi komence miksis parole kaj skribe vortojn slovakajn kun finnaj. Iam kaj tiam ŝi mem havis la senton, ke ŝi bone

scipovas neniun lingvon. Dum ŝia televida intervjuo mi havis tute alian opinion kaj tion mi esprimis al ŝi dum nia telefona interparolo. En la eseo verkistino Salmela interese ilustras siajn spertojn en la dulingva mondo. Iom post iom malaperas iuj sukaj trajtoj de la slovaka lingvo. Aliflanke ŝi kutimiĝas eviti latinajn kaj anglajn vortojn en sia finna lingvo.

Iom trista fakto por sinjorino Aleksandra estas la jam menciita fenomeno, ke la slovaka lingvo je ŝia dispono pli kaj pli paliĝas. Ŝi kvazaŭ perdas sian propran gepatran lingvon, la slovakon. Tre malofte estas eble interparoli kun aliaj denaskuloj samlandanaj el Slovakio.

Iam proksimaj geamikoj mencias, ke Aleksandra parolas en la elementa lernejo proprigitan lingvan varianton. Tiel okazas al kiu ajn en similaj cirkonstancoj. Kvankam nune la distancoj inter landoj ne katenas nin, sed iel ili tamen limigas lernadon. Tre pala estas mia referaĵo koncerne la eseon de Aleksandra Salmela. Jam kvin jarojn mi ripetate legadis la menciitan verkon kaj tute aparte la kontribuaĵon de verkistino Salmela. Indas konatiĝi kun la libro de *Heidi Grönstrand* kaj *Kristina Malmio*.

Jorma Ahomäki
majo 2016

Vojaĝstipendioj ankoraŭ haveblas – Matka-apurahat vielä haettavissa

Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) ofertas tri stipendiojn al junuloj por partopreni iun esperantoaranĝon. La stipendioj valoras maksimume po 400 eŭroj kaj celas kovri la partopren- kaj vojaĝkostojn.

La stipendipetantoj rajtas mem elekti la partoprenotan aranĝon, kiu povas esti ekzemple la somera kurso de EAF en Iisalmi aŭ iu internacia evento kiel Internacia Junulara Kongreso (IJK) aŭ Junulara E-Semajno (JES). Ekzemple ĉe www.eventoj.hu troveblas multaj eblaj aranĝoj.

La kondiĉoj estas, ke la ricevanto jam konas la elementojn de Esperanto kaj estas preta post la vojaĝo raporti pri sia partopreno en Esperantolehti.

La liberforman peticion oni direktu al la estraro de EAF kaj sendu al estrarano Paula Niinikorpi retroŝte (paula.niinikorpi@gmail.com). Ŝi donas laŭbezzone ankaŭ pliajn informojn.

Suomen Esperantoliitto jakaa kolme matka-apurahaa nuorille esperantotapahtumaan osallistumiseksi. Apurahoilla on tarkoitus kat-

taa matkaajien osallistumis- ja matkakulut, ja ne ovat suuruudeltaan kukin korkeintaan 400 euroa.

Apurahan hakija voi vapaasti valita tapahtuman, johon osallistuu. Kohde voi olla esimerkiksi Esperantoliiton järjestämä kesäkurssi Iisalmessa tai jokin kansainvälinen tapahtuma kuten Internacia Junulara Kongreso (IJK) tai Junulara E-Semajno (JES). Esimerkiksi sivustolta www.eventoj.hu löytyy melko kattava listaus esperantotapahtumista.

Hakuehtona on esperanton alkeiden osaaaminen. Matkan jälkeen tulee myös kirjoittaa raportti Esperantolehteen tapahtumaan osallistumisesta.

Vapaamuotoiset hakemukset osoitetaan Suomen Esperantoliiton hallitukselle ja toimitetaan hallituksen jäsen Paula Niinikorville sähköpostitse osoitteella paula.niinikorpi@gmail.com. Paula Niinikorpi antaa tarvittaessa myös lisätietoja.

La estraro de EAF –
Esperantoliiton hallitus

Helgi Hromova

9.9.1940–30.5.2016



Ln Estonio, sur la insulo Saaremaa, nin forlasis la aktiva esperantistino kaj diplomita E-instruistino *Helgi Hromova*, membro de Tallina E-klubo kaj ILEI-reprezentanto.

Helgi studis Esperanton en *Pisanica/Bulgario, Poprado/Slovakio* kaj *Karlskoga/Svedio*. Ŝi estis talenta respondeca sekretario de *Esperanto-Instituto de Estonio* (EIE) kaj partoprenis la Universalajn E-Kongresojn en Tampere, Pra-

go, Berlino, Gotenburgo, Vilno kaj Rotterdamo.

Helgi estis homo de vasta spirithorizonto kaj profunde studadis fremdlingvojn kaj historion. Ŝi estis vivoplena kaj mirinde amikeca al homoj de diversaj nacioj. Esperanto estis ŝia hejma lingvo.

La memoro pri ŝi restos por ĉiam.

*Roman Ŝvecov,
Estinta studento de EIE, Tallino.*

Monda Tago de Rifuĝintoj: Mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj de Universala Esperanto-Asocio

Monda Tago de Rifuĝintoj (20-a de junio) reprezentas specialan okazon por fari tion kion ni devas fari en ĉiu tago de la jaro, nome konsideri kaj mildigi la malfeliĉan staton de la tutmonde kreskanta nombro de rifuĝintoj – homoj forpelitaj el siaj hejmoj pro konflikto, kaj enplektitaj en armitaj disputoj ne de ili kreitaj. Kongrue kun nia ĉefa celo, nia organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio, aparte interesiĝas pri klopodoj faciligi la lingvan situacion de tiuj rifuĝintoj. Rifuĝintoj perdis pli ol siajn hejmojn kaj sian vivpanon: ili perdis ankaŭ la komunumojn kaj kulturojn, kiuj subtenas ilin. Ofte la lingvoj de tiuj komunumoj ne estas vaste parolataj en la lokoj, en kiuj ili nun troviĝas. En tiaj cirkonstancoj, ili despli malfacile kapablas klarigi sian situacion al aliaj, kompreni eĉ la simpatiajn reagojn de tiuj kiujn ili renkontas, kaj trakti kun la oficialaj funkciuloj kiuj ofte tenas en siaj manoj ilian estontecon.

Sekve ni forte petas al Unuiĝintaj Nacioj, ke la organizaĵo faru ĉion eblan por certigi

- Ke komunikado kun rifuĝintoj okazu en lingvoj, kiujn ili povas kompreni,

- Ke la funkciuloj, kiuj traktas kun la rifuĝintoj ricevu trejnadon pri tiuj lingvoj,
- Ke specialaj servoj estu starigitaj por aŭskulti kaj plusekvi la rakontojn kaj zorgojn de la rifuĝintoj en iliaj propraj lingvoj,
- Ke edukaj servoj en taŭgaj lingvoj estu disponigataj al rifuĝintaj infanoj kies lernado estis interrompita kaj kies estonteco estas sekve endanĝerigata.

Komprenema atento al la lingvaj bezonoj de rifuĝintoj estas ne nur principa demando sed ankaŭ demando de bona praktiko.

Enskribita en la statuton de nia Asocio estas respekto por ĉies rajtoj tia kia ĝi estas esprimita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiun ni konsideras ”esenca kondiĉo por nia laboro.” Socia justeco kaj lingva justeco iras manenmane. Ni devas memori nin pri tiu fakto en ĉiu tago de la jaro – sed speciale dum la Monda Tago de Rifuĝintoj.

[GK 619]

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☐ onni.kuappinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 ☐ kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☐ www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaäin r.y. / Esperanto-societo Antaäin, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☐ www.esperanto.fi/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☐ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☐ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☐ esperarto@phnet.fi.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2016

Nro	Limdato	Aperas
4/2016	1.9.	en septembro
5/2016	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoi

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 € 1/1 sivu/paĝo 50 €

1/2 sivu/paĝo 60 € 1/2 sivu/paĝo 30 €

1/4 sivu/paĝo 40 € 1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.

Somera ekskurso

- KIO OKAZOS? Ni ŝip-ekskursos mardon la 28.6. en *Tampere*.
- KIUJ? Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri belaj vidaĵoj kaj naturo. La kerna grupo estas membroj de Antaŭen, sed ni volonte vidos alilokajn geamikojn inter ni.
- KIEN? Al la insulo *Vuikinsaari* en *Pyhäjärvi*. Ĝi estas agrabla familioparko en la distanco de 20-minuta veturado de Laukontori, kelkcent metrojn suden de la centra placo.
- Je KIOMA horo? La ŝipo ekiros je la 14-a. Ni renkontiĝu en sufiĉa tempo antaŭ tio.
- KION ni faros? Ni promenos laŭ la naturpado (2,5 km) ĉirkaŭ la insulo, lernos ion novan kaj ĝuos la freŝan naturon de la komencinta somero. Kompreneble la kafodento bezonas kuracadon, eble la korpo eĉ pli. Se vi deziras rosti kolbason, kunportu mem. Eblas naĝi en la lago.
- KIOM kostas? Plenkreskulo 10 €, pensiulo 8 €, infanoj (4–17 j.) 5 € – tien kaj reen.

BONVENON!

Esperanto-societo Antaŭen: www.esperanto.fi/tampere



Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 1.9.2016 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 1.9.2016 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.